

Doris Wildgrube,

Sankta vespero

tradukita de Manfred Retzlaff

Venas je la jaro-fino
Sankta de l' Vesper' trankvil',
regas jen en ĉiuj ĉambroj
de multnombraj lumoj bril'.

Multaj bonaj aĵoj kuŝas
sur la dono-tabloj por
la infanoj, sed enestas
veo-sent' en mia kor'.

Multaj homoj sur la Tero
havas zorgojn tiom da;
milionoj da infanoj
ne ricevas donojn ja.

Ho Sinjor', finfine lasu
regi pacon sur la Ter':
ĉar por ni nur tiam estos
vere Sankta la Vesper'.

*Traduko de la Germana poemo "Heiligabend" de Doris Wildgrube en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2007-11-07.*

MR-463-1 / Arg-809-1623 (2013-02-01 10:02:28)